

# *Esperanto en Danio*

17-a jarkolekto • n-ro 3 • junio 2010



Partoprenantoj de la jarkunveno

## **Esperanto en Danio**

membroorgano de  
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

### **Adreso de la asocio/prezidanto:**

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 [dea@esperanto.dk](mailto:dea@esperanto.dk)

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

### **Kromaj estraranoj:**

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Regin Larsen

Ole Therkelsen

### **Redakcia adreso:**

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

Retadreso: [eed@esperanto.dk](mailto:eed@esperanto.dk)

### **Presado:**

DDFO

### **Adresŝanĝoj al:**

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas  
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**01.09.2010**

## **Enhavo**

<b>Survoje al Havano.....</b>	<b>3</b>
<b>Ĉina-Vjetnama kunlaboro.....</b>	<b>4</b>
<b>Kortega danko.....</b>	<b>4</b>
<b>Protokolo.....</b>	<b>5</b>
<b>Kopenhago.....</b>	<b>9</b>
<b>Næstved.....</b>	<b>10</b>
<b>Tulipo Esperanto.....</b>	<b>10</b>
<b>Paperaj gazeteltondaĵoj.....</b>	<b>11</b>
<b>B-balotoj de UEA.....</b>	<b>12</b>
<b>Nia Vikipedio kreskas.....</b>	<b>13</b>
<b>Esperanto – ĉu utopio?.....</b>	<b>14</b>
<b>Malferma Tago de UEA.....</b>	<b>15</b>
<b>Brita-persa kunlaboro.....</b>	<b>16</b>
<b>Postnikov en Bosnio.....</b>	<b>16</b>
<b>Kursoj en Lesjöfors.....</b>	<b>17</b>
<b>Herzberg.....</b>	<b>17</b>
<b>Pri la nova vortaro.....</b>	<b>19</b>
<b>Ŝercoj.....</b>	<b>22</b>

## Survoje al Havano



Jen alproksimiĝas la 95 UK en Havano kaj la tago de nia forvojaĝo tie, kie la kongresa flago estos oficiale transdonita al nia LKK. Ni kunportos filmeton pri Kopenhago eldonitan de Wonderful Copenhagen kaj filmeton ricevitan de Bella Centro pri la eblecoj de tiu kongresejo. Ni strebos konvinki la ĉijarajn kongresanojn alveni amase al nia 96 UK. Post Havano la laboro certe intensiv-iĝos, eĉ se nia LKK jam dum la lasta jaro aktivas diversmaniere. Post Havano nin atendas la preparlaboro kaj detala planado pri la diversaj servoj kaj la bezonataj helpantoj dum la kongreso. Tiam ni komencos varbi helpantojn inter niaj membroj, laŭ la bezono kaj povo.

Pri varbado al 96 UK ni havas kontakton kaj interkonsenton pri kunlaboro kun la Ĉina Internacia Radio pri elsendoj kun informoj pri la UK kaj pri Danio ek de aŭtuno, kaj ankaŭ en la revuo Esperanto aperos artikolojn pri Danio kaj nia movado. Nia fokuso direktiĝos al la tasko informi la danan loĝantaron pri la kongreso pere de amaskomunikiloj. Jam ĉijare ni spertis la intereson de novaj kursanoj lerni Esperanton por partopreni la kongreson.

Kiel membrojn de la honora komitato ni ĝis nun varbis la ĉefurbestron de Kopenhago Frank Jensen, la kultururbestron Pia Allerslev, la direktoron de Dana Radio Kenneth Plummer kaj aliaj sekvos....

Unu el la gravaj taskoj ĝin nun ankoraŭ ne plenumitaj estas la financado de la nacia vespero. Ni daŭre sendas monpetojn al diversaj fondusoj, kaj esperas esti bonŝancaj. Ni trege esperas havi la eblecon montri belan eventon al niaj kongresaj gastoj.

*Ileana Schröder*

# Ĉina-Vjetnama kunlaboro

Jen grava informo de Profesoro Liang Ziming post vizito al Vjetnamio:

“..... En la urbo Ho Chi Minh, ni vizitis du grandajn firmaojn, ekz. TTC Express havanta 1400 laborantojn en la tuta lando, Tojo produktanta kaj eksportanta manĝaĵojn. Estroj de ambaŭ grandaj firmaoj konsentis uzi Esperanton en komerca agado.

Konkrete estas, ke ili presos uzotajn klarigojn sur ĉiuj pakaĵoj de la varoj nur en Esperanto, en la vjetnama kaj en la ĉina, sed ne en la angla inter nia komerca kunlaboro. ....”

Pliaj detaloj videblas ĉe la retejo de Vjetnama Esperanto-Asocio  
<http://e.vea.vn>.

## Kortega danko

Kiel ni informis en nia Novaĵletero n-ro 6, DEA donacis la libron ”La novaj vestoj de la Imperiestro” al la reĝino Margrethe II okaze de ŝia 70-a naskiĝdatreveno la 16-an de aprilo. Antaŭ kelkaj tagoj ni ricevis jenan respondon:

CHRISTIAN IX's PALÆ  
AMALIENBORG  
1257 KØBENHAVN K

*Til Fru Ileana Schrøder*

*Hendes Majestet Dronningen har pålagt mig at bringe Dem en hjertelig tak for bogen ”La Novaj vestoj de la Imperiestro”, som De så venligt glædede Dronningen med i anledning af fødselsdagen.*

*Venlig hilsen*

*Annette de Scheel*

*Hofdame*

# Protokolo

## *de la Ĝenerala kunveno de Dana Esperanto-Asocio 25.04.2010*

Ĉeestantoj: 24 membroj, 7 estraranoj (Ileana Schrøder, Arne Casper, Bent Jensenius, Finn Østerbæk, Jens S. Larsen, Ole Therkelsen, Regin Larsen)

### **1. Elekto de kunvena gvidanto**

Lars Kromann estis elektita kiel gvidanto. Li konstatis ke la ĝenerala kunveno estis laŭstatute kunvokita.

### **2. Elekto de protokolanto**

Tara Gregers estis elektita kiel protokolanto.

### **3. Jara raporto**

La prezidantino Ileana Schrøder laŭtlegis la jaran raporton. La jara raporto estas legebla en "Esperanto en Danio" 1/2010. La raporto estis aklame aprobita.

*Komentoj/Demandoj:*

Kim Henriksen demandis pri la listo esperanto.dk, ĉu ĝi nur estas por DEA membroj, ĉar tiu informo aperas el la reto. Ileana diris ke tiu listo estas por ĉiuj, ne nur por DEA membroj kaj ke oni mem membriĝas. Ni korektos la tekston en la reto.

Betty Chatterjee proponis ke ni sendu "Esperanto en Danio" per retroŝto por ŝpari monon. La estraro pripensos la proponon.

Clara Jensen demandis ĉu DEA povas sendi novaĵojn pere de "sms". La estraro pripensos la proponon.

### **4. Jara kalkulaĵo**

La kasisto Arne Casper prezentis la jaran kalkulaĵon. Post kelkaj klarigoj ĝi estis aprobita.

*Komentoj/Demandoj:*

Ole Blaust proponis ke ni malfondu la Noll Fonduson ĉar ĝi ne havas monon kaj pruntis monon ĉe DEA. Ileana respondis ke la estraro agos kiel proponite.

## **5. Laborplanoj de DEA 2010-2011**

Ileana prezentis la planojn. Ĝi estis akceptita.

*Informado:*

- Partopreno en foiro en Kopenhago kaj Ålborg
- Organizado de prelegoj
- Flegi la kontaktojn kun oficialaj instancoj kaj NGO organizoj
- Kontakto kun UNESCO por promoviĝo de la jardeko de lingvoj
- Informado pri la UK en Kopenhago

*Instruado:*

- Kunlaboro kun ILEI sekcio por plifortigi la lingvan nivelon de nia membraro pere de kursoj kun eksterlandaj gastoj
- Apogo al perfektigo de junaj instruantoj

*Utiligado:*

- Organizi jarkunvenon kun alloga programo
- Apogi DEJO en ilia agado
- Subteni la utiligon de Esperanto fare de niaj lokaj kluboj
- sed precipe aranĝi la UK en Kopenhago kaj intense labori por ĝia sukceso!

*Komentoj/Demandoj:*

Kim Henriksen petis DEA publikigi la planojn antaŭ la kunveno, papere aŭ rete. Ileana respondis ke la estraro konsideros la proponon.

## **6. Proponoj**

Neniuj proponoj ricevitaj.

## **7. Elekto de prezidanto**

Ileana Schrøder estis aklame reelektita.

## **8. Elekto de 3 estraranoj**

Ole Therkelsen, Arne Casper kaj Bent Jensenius estis aklame reelektitaj kiel estraranoj.

La nunaj anstataŭantoj estas Ejnar Hjorth kaj Stanislaw Mielczarek kaj

ambaŭ akceptas reelelekton.

Ne estis aliaj proponoj.

Ejnar kaj Stanislaw estis reelektitaj kiel anstataŭantoj.

## **9. Elekto de 2 revizoroj kaj anstataŭanto**

Tara Gregers kaj Lars Kromann estis aklande reelektitaj kiel revizoroj.

Kamma Trandum proponis sin kiel anstataŭanto kaj ŝi estis aklande elektita kiel anstataŭanto.

## **10. Ĝenerala kunveno 2011**

La venonta jarkunveno de DEA okazos la 9.-10-an de aprilo 2011, en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 30, Kopenhago.

## **11. Eventualaĵoj**

Jakob Nordfalk demandis ĉu oni povas uzi lian kalendaron ĉe Google por ĉiuj aranĝoj en Danio kaj Svedio. Betty Chatterjee diris ke ŝi provis uzi la Google-kalendaron persone, sed ŝi ne sukcesis. Jakob promesis prelegon dum iu klubvespero pri la uzado. Betty kaj Jakob aranĝos ĝin. Ileana komentis ke ni jam havas kalendaron rete, kaj ĝi bone funkcias.

Jonas Dalmose deziris kunveni por paroli pri UK2011. Ileana respondis ke DEA cetere informas per novaĵletero, "Esperanto en Danio" kaj dum klubvesperoj.

Henning Olsen petis nin sendi gazeteltondaĵojn al Grete en Næstved.

Ina Schultz proponis ke la programo dum la venonta jarkunveno precipe estu pri la universala kongreso en Kopenhago 2011.

Ileana Schröder informis pri UK2011:

- Prezenti la unuopajn membrojn de LKK.
- Informi ke UEA prizorgas la kongresejon (Bella Center), hotelojn kaj programon dum UK2011.
- Post la kongreso en Kubo DEA informos pli detale (helpantoj, ĉiĉeronoj).
- La ILEI konferenco 2011 okazos la semajnon antaŭe nia UK2011, en la Kopenhaga Universitato.
- LKK daŭre monpetas por la Nacia Vespero kaj informmaterialoj.

- Ileana tralegis la tre pozitivan respondleteron de Frank Jensen kaj persvados lin eniri en la honoran komitaton.
- Ni esploras ĉu ni povas havi ŝildojn en la stratoj (Strøget, H.C. Andersens Boulevard).
- La kongresa hejmpaĝo estos preta en aŭgusto 2010.
- La Infana Kongreseto okazos en Hundested, en bieno.
- La komunumo ne permesas koncerton ĉe Rådhuspladsen pro la konstruado de la nova metroo.
- La Ekumena Diservo estos en Vor Frue je la 15-a horo.

Ana Røssum demandis pri antaŭ- kaj postkongresoj. Ileana informis nin ke DEA en decembro sendis ekskursproponojn al CO, sed ĝis nun ne ricevis respondon.

Betty Chatterjee demandis pri tiuj tekstoj, kiujn KEK tradukis por la libreto pri Kopenhago. Ileana respondis ke ni ankoraŭ ne ricevis monon por eldoni la libreton.

Henning Olsen demandis kiel ni prezentos Kopenhagon en Kubo. Ileana informis ke ni kunportos la “Unuan Bultenon” kaj filmon pri Kopenhago. Ni finfaros la filmon kune kun Wonderful Copenhagen. Ni havos budon.

Kim Henriksen estis scivolema pri la Junulara Programo. Jonas Dalmose rakontis pri siaj spertoj en Bjalistoko.

Kim Henriksen komentis ke havi malmultekostajn dormeblecojn estas grave. Bent Jensenius respondis ke li trovis lernejon en Amager, sed ĝi kostas 35.000 kr. por unu gimnastika salono, por dormi sur la planko. Kim diris ke li estas membro de la urba konsilantaro de Amager, do eble li povas helpi.

Betty Chatterjee demandis ĉu eblas tendumi? Ileana Schrøder respondis ke oni planas ĉe Danhostel apud la kongresejo fari tendumejon. Sed oni ne povas aserti ke ĝi estos preta por la UK2011.

Protokolo aprobita de la protokolanto kaj la gvidanto



# Kopenhago

Prezidanto: Betty Chatterjee, [chatterjeebetty@hotmail.com](mailto:chatterjeebetty@hotmail.com). La kunvenoj de Konversacia Esperanto-Klubo okazas ĉiun lundon ekde la 19:30 en Tomsgårdsvej 35. NB: Ni troveblas ankaŭ en Facebook ĉe “Amikoj de la Kopenhaga Esperantisto-klubo”.

## Okazis:

La 29-an de marto Jacob Nordfalk prelegis en KEK pri maŝintradukado. Tiun prelegon estis registrita kaj estas spektebla rete. Jen la ligilo: <http://vikitraduko.saluton.dk/apertium-prelego/>.

La 3-an de majo venis kelkaj membroj, kiuj pro la malproksimo malofte vizitas nin. Unu el la partoprenintoj skribis al Betty dankan mesaĝon: ‘Estis tre interesa hieraŭ vespere. Mi opinias ke la prelego pri Islamo estis bona kaj objektiva.’ Betty konsentas, kaj dankegas al Amir.

## Okazos:

07-06-10 Jan kaj Lene prelegas pri Irlando

14-06-10 Betty rakontos pri la brita Esperanto-kongreso en Llandudno.

21-06-10 Somera festo.

09-08-10 Raporto pri la Universala Kongreso en Kubo kaj la anticipoj pri la venonta Universala Kongreso. Ileana Schrøder.

16-08-10 Membraj raportoj pri someraj travivaĵoj eventuale montrante fotojn ktp

23-08-10 Membraj recenzoj pri legindaj libroj.

Sabate  
28-08-10 La Kopenhaga internacia tago ĉe la lago, Nørrebro.

30-08-10 (planota)

06-09-10 Prelego. Ole Therkelsen pri kongresaj paroladoj de Zamenhof.

13-09-10 Kiu estas la plej videnda vidindaĵo en Kopenhago? Jen ege debatinda temo. Tial prezentu vian plej ŝatatan.

## Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tel 55 72 12 40, rete atingebla pere de: [eho-esperanto@stofanet.dk](mailto:eho-esperanto@stofanet.dk) - Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111.

### Okazos:

Krom la somera ekskurso la 12an de junio al Stevns ne estas planitaj aliaj aranĝoj dum al somero. Ni planas komenci la venontan aŭtunan sezonon per danlingva prelego la 1an de oktobro. – Rigardu cetere nian hejmpaĝon: [www.esperanto-i-naestved.dk](http://www.esperanto-i-naestved.dk).

## Tulipo Esperanto



Ĉu vi konas ĉi tiun belan floron? Ĝi estas ruĝa, sed notu la verdan strion. La esperantisto S-ro J. Prangere el Nederlando malkovris la tulipon en 1968; ĝi estas mutacio de la tulipo nomata “Hollywood”. En 1979 ĝi rivecis kvalifikon “Tulipo Esperanto”.

*Tara Gregers*

Se vi interesiĝas pri korespondo kun japanoj, bonvolu turni vin al  
Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto  
Sinzyuku-ku, Waseda-Mati 12-3  
Tokio, Japanio  
Skribante al ni korespondo-peton, bonvolu aldoni vian aĝon,  
sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn por faciligi nian  
laboron.

# Paperaj gazeteltondaĵoj

Januaro:

Prelego de Tom Borgmann menciita unufoje en Næstved-medio.

Frederiksborg Amts Avis pri Peter Weide: Fik esperanto ind med modermælken.

Februaro:

Jernbanefritid: DEFA på Danmarks sprogmuseum.

Prelego de Lene kaj Jan Niemann pri Irlando menciita 3-foje en Næstved-medioj.

Ugebladet, Næstved: Asocia registro.

Marto:

Prelego de Mogens Rude Andersen pri steloj menciita 4-foje en Næstved-medioj.

Jernbanefritid: Jernbanen og de skjøne kunster.

Aprilo:

Illustreret Videnskab: Malgranda noto: Esperanto blev opfundet af øjenlæge.

Radioprogramo de Radio Vatikano.

Jernbanefritid: Kongressernes fremtid – fremtidens kongresser.

Magazino *Historie* pri Volapyk (Esperanto menciita).

Majo:

Ugebladet, Næstved: Asocia registro.

Belaspekta afiŝo pri koncerto de internacia virina koruso *Verdens Sirener*; en kiu membras Betty Chatterjee, kaj kiu kantas en pluraj lingvoj, i.a. Esperanto. La afiŝo informas pri tio!

Næstved-Bladet: Lidt om esperanto (precipe pri la nova vortaro - estos interese sperti, en kiom da gazetoj aperas tiu informo – kaj kiom da membroj tondos kaj sendos!).

Kvankam la gvidantaro de DEA silentis post nia riproĉo al vi ĉe la ĝenerala kunveno ni daŭre insiste instigas vin vekigi kaj sendi ĉiajn menciojn pri Esperanto al Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.

## B-balotoj de UEA

La supera organo de UEA estas la Komitato. La komitatoj dividiĝas en tri grupojn: A, B kaj C. Komitatoj B reprezentas la individuajn membrojn. Por ĉiu komencita milo da membroj estas unu Komitato B. Krome ĉiu landa kaj faka asocio, aliĝinta al UEA, rajtas nomumi Komitatanon A, se ĝi havas pli ol 100 membrojn. Aliaj asocioj nomumas observantojn, kiuj ne havas voĉdonrajton en la komitatkunsidoj. Fine la Komitatoj A kaj B rajtas alekti Komitatojn C, kies nombro ne rajtas esti pli ol la kvarono de tiu de la Komitatoj A kaj B.

La balotado pri B-komitatoj okazas ĉiun trian jaron, kaj 2010 estas balotjaro. Dum la printempo balotilo estis sendita al 4801 individuaj membroj, el kiuj voĉdonis 1550, t.e. 32,3%. Estis 1527 validaj kaj 23 malvalidaj balotiloj. La balot-aktiveco klare superis tiun de la antaŭa fojo en 2004, kiam 29,0% de la membroj voĉdonis, sed ĝi ne atingis la rekordon de 33,6% en 1998. Plej multe da voĉoj, 1010, ricevis Mark Fettes. La aliaj kvin sukcesaj kandidatoj estis Probal Dasgupta (973), Barbara Pietrzak (876), Amri Wandel (820), José Antonio Vergara (816) kaj Wu Guojiang (732). Ne elektitaj estis Petr Chrdle (653), Jukka Pietiläinen (613), Marija Beloševic (529), Tomasz Chmielik (491), Paulo Branco (443), Josip Pleadin (309) kaj Johan Derks (282).

[Gaz Kom UEA 382]



*La voĉoj estas kalkulataj de CO-stabanoj kaj invititaj individuaj membroj el Roterdamo*

# Nia Vikipedio kreskas

## Esperanta vikipedio ricevis rekonon pro kresko

La Esperanto-vikipedio ricevis rekonon pro la plej granda kresko de la mil “havendaj artikoloj” dum aprilo 2010. En tiu listo enestas la temoj, kiuj laŭ la vikipedio-kunlaborantoj nepre enestu en ĉiu vikipedio; enestas ankaŭ Esperanto, inter entute 18 lingvoj.

Esperanto estas nun kun unua loko menciata sur la paĝo, kie oni sekvas la plej grandajn kreskojn de tiuj artikoloj en unuopaj vikipedioj. En komparo kun la aliaj lingvoj Esperanto antaŭeniris dum aprilo de la 37-a loko al la 33-a.

## Sukcesa "Monato de Vikipedio"

Tiu kresko estas la plej videbla sukceso de la “Monato de Vikipedio”, kiun survojis Marek Blahuš kadre de E@I. Akompanis la kampanjon konkurso, en kiu partoprenis entute 28 vikipediaj kunlaborantoj. La rezulton de la konkurso oni aperigis fine de majo.

## Esperanta Vikipedio kun pli ol 450.000 artikoloj

Tamen nun oni enkondukas ankaŭ aŭtomatan tradukadon por antaŭenigi la laboron. En eĉ ne du monatoj oni per la programo WikiTrans tradukis 300.000 artikolojn de la angla Vikipedio al surprize bona, eĉ se ne senpeka Esperanto. Post jaro oni probable atingos tri milionojn.



“... La WikiTrans-projekto estas esplor- kaj evoluigo-projekto de la dana lingvoteknologia firmao GrammarSoft ApS [Eckhard Bick], kunlabore kun University of Southern Denmark (Suddana Universitato). La ĉefa celo de la projekto estas permesi trans-lingvan uzadon de Vikipedio-artikoloj, pere de paralela tradukita retejo.

Unuavice la ideo estas oferti aliron al la plej granda Vikipedio de ĉiuj – la angla, kun pli ol 3 milionoj da artikoloj – en Esperanto kaj la dana. Kvankam ambaŭ lingvoj estas inter la pli grandaj Vikipedioj, iliaj po ĉ. 130.000 artikoloj konsistigas nur modestan kolekton

kompare al kio haveblas en la angla. Krome, la individuaj artikoloj estas ofte multe pli malgrandaj ol iliaj anglaj analogoj, malpli dense fontigitaj aŭ simple tiel nomataj ĝerموj. ...

### **Ĉu ŝanĝi prioritatojn?**

... Vi certe trovos ankoraŭ multajn aliajn pridiskutindajn aspektojn. Sed ŝajnas al mi klare, ke la tuta Wikipedia agado devas esti profunde repensita. Ĉu nova prioritato ne devas esti korekti la tradukojn anstataŭ mem ekverki? Kaj se oni originale ekverkas, ĉu oni ne prioritare verku pri verdlandaj, esperantaj ‘naciaĵoj’, kulturo ktp. ne troveblaj en la angla Vikipedio?...”

La tuta artikolo estas legebla en la blogo de Bernhard Pabst ĉe <http://www.ipernity.com/blog/37943/248693>

*[ret-info]*

## **Esperanto – ĉu utopio?**

En la fama usona filmfestivalo Sundance estis montrita dokumenta filmo nomita “Utopio en kvar movimentoj”, en kiu Esperanto grave rolas. La filmprezento estis parte financita el subvencio de la fonduso Esperantic Studies Foundation.

Sub direkto de la filmisto Sam Green, kiu estis proponita por la Akademia Premio (Academy Award), la filmo celas dokumenti la historion de la utopia impulso en la moderna epoko. Ĝia unua kazoprezento, aŭ movimento, pritraktas esploron de la historio, valoroj kaj idealoj de la planlingvo Esperanto. Postaj movimentoj fukusiĝas je la senfina optimismo de usona ekzilito en Kubo, la aktuala ekonomia eksplodo en Ĉinio kaj ĝiaj efikoj je la enloĝantoj de tiu lando, kaj la deziro de iuj personoj doni al homaj postrestaĵoj dignan enterigon.

La verko estas unika inter dokumentaj filmoj en tio, ke ĝi enhavas vivan rakontadon de la direktoro mem kaj muzikan akompanon, kiu ankaŭ estas ludata vive.

La novaĵa retejo Huffington Post komentis, ke Utopio estas "la plej engaĝa ekranigo de la tuta festivalo [Sundance 2010] ... [ĝi estis] komplete emociiga."

*[el uea-membroj]*

# Malferma Tago de UEA

## Malferma Tago spite la cindran nubon

Pli ol 70 partoprenantoj vizitis la 32-an Malferman Tagon de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 17-an de aprilo. Multaj estis malhelpitaj pro nuligitaj flugoj aŭ fortimigitaj de plenplenaj trajnoj sekve de la haltigo de aertrafiko pro la cindra nuboj elspuita de islanda vulkano.

La ĉefgasto estis d-ro Mark Fettes, asista profesoro pri edukado en la Universitato Simon Fraser en Vankuvero. Fettes prelegis dufoje pri Esperanto kaj la monda eduka problemo, klarigante sian ideon pri UEA kiel unuavice eduka organizaĵo. Nora Caragea legis el “Pacrakontoj”, kiu estas jam la kvara libro de la germana aŭtoro Gudrun Pausewang en ŝia traduko. Rob Keetlaer prezentis sian retejon pri proverboj: <http://www.proverbaro.net>. Sian agadon prezentis ankaŭ TEJO kaj E@I, dum komitatano Johan Derks diskutigis interesitojn pri la utilo de reta decidfarado. Ankaŭ pluraj filmoj estis montritaj.

La venonta Malferma Tago estos sabaton, la 27-an de novembro en 2010.

## Filmo pri informado kun Mark Fettes

La 18-an de aprilo 2010 okazis en la Centra Oficejo de UEA seminarieto pri informado, kiun kunorganizis E@I kaj UEA. Grandan parton de ĝi oni dediĉis al la prezentado de la portalo [aktuale.info](http://aktuale.info), kiu informos pri Esperanto kaj pri Esperanta agado en diversaj lingvoj. La portalo estas preparata de E@I kun subteno de Esperantic Studies Foundation.

D-ro Mark Fettes parolis en la seminario pri la evoluigo de la informado pri Esperanto. En la Reta Kinejo de UEA eblas vidi 45-minutan filmon, kiu konsistas el la kontribuo de Fettes kaj el la posta diskuto.

Ĝi estas trovebla ĉe: <http://www.ipernity.com/doc/97850/7843129>

[Ret-Info]



## **Brita-persa kunlaboro**

Ok membroj de la brita parlamento skribe konfirmis ke ili nomumas UEA por la pacpremio de Nobel de la jaro 2010. Temas pri reprezentantoj de ĉiuj tri tutlandaj partioj. Tio rezultigis longan preparolon ĉe la perslingva sekcio de BBC, kiu intervjuis la iranan verkistinon Pari Nush SANII, kiu mem scias Esperanton, kaj la kunordiganto de la brita “Esperanto-lobio” Brian Barker. Interalie s-ino Sanii indikis la nombron de Esperantistoj al “100.000 ĝis du milionoj”.

## **Postnikov en Bosnio**

La unua prezentado de la teatraĵo "DEK TAGOJ DE KAPITANO POSTNIKOV", laŭ romano de la rusa verkisto Mihael Bronŝtejn kaj reĝisorado de Miliĉ Jovanoviĉ el Serbio, okazis la 23-an de marto en Banja Luka, en la urba teatro ‘Jazavac’ (Melo). La teatraĵo estis en Esperanto, kaj vizitantoj kiuj ne komprenis Esperanton povis legi tradukon en serba lingvo sur blanka tolaĵo.

Ĉirkaŭ 200 spektantoj kelkfoje dum la teatraĵo aplaŭdis kaj tre bone akceptis ĝin. Post la teatraĵo okazis solena koktelo kie la spektantoj babilis kun la aktoroj kaj faris fotojn.

Bosniaj ĵurnaloj abunde raportis pri la interesa teatraĵo. Prezidanto de Komunumo de urbo Banja Luka, s-ro Slobodan Gavranoviĉ estis alta protektanto de la okazaĵo kaj li akceptis la aktorojn kaj la organizantojn .

Kapitano Postnikov, artileria oficiro de rusa reĝa armeo vivis en tempo antaŭ la Oktobra Revolucio. Li suferis pro siaj progresemaj ideoj, ĉar li deziris ke ĉiuj popoloj en la mondo interparolu per unu internacia lingvo Esperanto – klarigis al ĵurnalistoj post la prezentado de la teatraĵo la ĉefa aktoro Saŝa Pilipoviĉ el Serbio. En la teatraĵo ludas ankaŭ Miĉo Vrhovac el Banja Luka (Bosnio kaj Hercegovino) kaj Ljubica Gaŝparoviĉ el Kragujevac (Serbio).

Sian unuan prezentadon la teatraĵo havis dum la 94-a UK en Bjalistoko. Ĉi-jare la teatraĵo estos prezentita en Sankt-Peterburgo dum la Ruslanda Esperanto-Kongreso kaj en Velika Gorica dum la kongreso de Kroatia Esperanto-Ligo.

*[Ret-Info]*



# Kursoj en Lesjöfors

Novajoj de la jaro! Post la tagmanĝo vi povas ekscii pri

- Esperantologio – kurso instruata de Roland Lindblom
- Kiel traduki sian poemon aŭ kantotekston en Esperanton – gvidate de Martin Strid.
- Esperanto inter skoltoj – Lordo Baden Powell volis ke la skoltoj utiligu Esperanton.

Krom tio, la kutimaj kursoj je tri niveloj.

Alvena tago: Mardo 13 de julio – forvetura taog merkredo 21 julio.

Retpaĝo: [www.esperanto.se](http://www.esperanto.se) (ligilo sub "Aktuell")

Retadreso: <kurs.egarden@esperanto.se>

Lesjöfors estas trankvila vilaĝo apud lageto inter vastaj altaĵaj arbaroj.

Bela somera aŭ vintra feriejo. Bonvenon al granda Esperanto-gastejo/kursejo!

*Douglas Draper (estranano de la kursejo/gastejo)*

## Herzberg

### **Ekspozicio**

Ĉe la GEA-Filio por Kulturo kaj Klerigado en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo troviĝas interalie migra ekspozicio kun ĉ. 40 bildokadroj pri la lingvo, kulturo, historio, turismo, uzebulo de Esperanto, ktp. Meze de junio 2010 oni prezentos la ekspozici-materialon okaze de Revelo-Tago en Stockum ĉe Sundern (Vestfalia).

Eble la Interkultura Centro Herzberg preparos dum aŭtuno 2010 duan pli malgrandan ekspozicimaterialon pri la nuntempa Esperanto-movado. Certe vi ankoraŭ aŭdos pri tio.

## Muzeo

La urbo Herzberg disponigos unikan informplatformon pri Esperanto kaj Esperanto-urbo (supra koridoro) en la muzeo de la Welf-Kastelo de Herzberg am Harz. Tion ni baldaŭ devos plani, financi, ktp., por ke ekestu tie konstanta, alloga varbilo.

Krome la urbo disponigas 4 novajn salonojn en la muzeo por specialaj, porokazaj ekspozicioj. Nia propono pri Esperanto celas prezenti la sekvajn temojn: Esperanto kaj Mond-Literaturo, Esperanto kaj Turismo, Esperanto kaj Filatelo, ktp.

## Princa favoro

Okaze de la 25-jara jubileo de la kastela muzeo okazis solena festo kun la ĉeesto de multaj gravuloj. S-ro urbestro Gerhard Walter denove publike emfazis la gravan rolon de Esperanto en Herzberg am Harz.

Ĉeestis i.a. ankaŭ la Welf-princo Henriko de Hanovro kaj duko de Brunsvigo, ja la kastelo estis la lulilo de la fama Welf-dinastio. La princo intencas doni finanĉan subtenon, por ke la muzeo ekhavu multtekostan modernan elektronikan gvidsistemon en la lingvoj germana, angla kaj Esperanto.

Zsofia Korody kaj Petro Zilvar de la Esperanto-Centro esprimis sian dankon kaj transdonis al li valoran Esperanto-medalon kun la kastela motivo kun la kvinpintstela simbolo. La konata Welf-princo kun ĝojo akceptis la donacon kaj volonte pretis por fotografado.



# Pri la nova vortaro

## Memintervjuo al la ĉefredaktoro



*Kial oni bezonis novan vortaron?*

Novan vortaron ĉiu ajn lingvoparo bezonas de tempo al tempo, kaj dum tre longe mankis novaj iniciatoj inter Esperanto kaj la dana. Depost 1990 ni havas uzeblan Esperanto-danan vortaron de Eckhard Bick, do DEA decidis formi laborgrupon por produkti vortaron en la inversa direkto. Laŭ nia peto, Eckhard “inversigis” sian Esperantan-danan vortaron kaj aldonis ĉe ĉiu dana kapvorto indikon pri la uz-ofteco, kaj jen ni havis bazon sur kiu labori.

*Kiam aperis la antaŭaj vortaroj?*

La lasta Esperanta-dana antaŭ tiu de Bick estis de L. Friis kaj P. Frey en 1938, kaj ĝi estis laste – senŝanĝe! – represita en 1969. Dua, reviziita eldono de la Bick-vortaro aperis en 1997. Sed la lasta dana-Esperanta estis tiu de Elisabeth kaj Harald Grønberg en 1949, kaj ĝi estis nek represita nek reviziita ĝis nun.

*En kiu maniero la nova estas pli bona aŭ ĝenerale malsama?*

La vortaro de Grønberg impresas kiel antikva poŝhorloĝo en la epoko de poŝtelefonoj. Ĝi estis necesega en sia tempo, sed dekomence ne tre profesie ellaborita. Ekzemple ĝi havas tendencon doni neprecizajn tradukojn ĉe malfacilaj vortoj kaj tro multajn ĉe iuj el la facilaj. Ĝi ankaŭ ne uzas kursivigon de la interkrampaj danlingvaj klarigoj ene de la unuopa artikolo, sed nur dikigon de la kapvortoj. Tio povus soni kiel neglektinda detalo, sed fakte estas la decida diferenco inter rekte forpuŝa tekstobildo kaj vortaro foliumebla pro nura plezuro.

*Kiel longe daŭris la laboro pri la nova vortaro?*

La origina intenco estis fari en unu-du jaroj vortoliston similan al la verko de Bick, kun multaj kapvortoj sed tre koncizaj tradukoj. Tamen, dum oni povas atendi ke progresinta esperantisto emas rekontroli ĉiun novan Esperantovorton en PIV, estas ege malfacile, precipe al komencanto,

esprimi sin en dua lingvo, se oni ne havas bonan vortaron el sia nacia lingvo. Tial la laboro daŭris du- aŭ trioble pli longe ol ni antaŭvidis, kaj eĉ tiam mi devis labori pri ĝi plentempe. La laboro de la Grønborg-vortaro daŭris dek jarojn, kaj cetere estis parte verkita en malliberejoj (unu kunlaboranto dum milite estis en la rezisto, alia poste rifuzis militservi).

*Kiom da homoj laboris pri via vortaro?*

Dek homoj plus la dizajninto de la kovraĵo. La kunlaboro estis treege agrabla, eble ĉar tri el ni havis kompetenton en apartaj kampoj: Ileana Schrøder, prezidantino de DEA, iniciatis kaj organizis la laboron; Regin Larsen, lertega juna inĝeniero, evoluigis la datumbazon; kaj fine mi mem, pro bibliotekista kaj lingvista spertoj, baldaŭ puŝiĝis en la pozicion de ĉefredaktoro.

*Ĉu ekzistas reta versio, malkiel Plena Ilustrita Vortaro?*

Jes, ĉe la evidenta adreso [www.vortaro.dk](http://www.vortaro.dk). Sendube iam ankaŭ PIV estos rete alirebla, sed mi estas komprenema ke oni hezitas. La papera formato en si mem impresas kiel ia garantio de seriozeco, aŭtentikeco ktp., kaj ĝi sendube estas bona enspezfonto por SAT. Krei komercan modelon funkci-kapablan perrete ankaŭ estas malfacile.

*Ĉu haveblos ankaŭ elektronika versio (do ne nur reta)?*

Jes. Dum la vortaro estis ellaborata, Jacob Nordfalk (unu plia el niaj “komputilaj sorĉistoj”) estis en Nepalo pro la laboro de sia edzino. Tie li helpis kompili Nepalano-Esperantan vortaron, kaj nun li laboras pri poŝtelefonaj versioj de la 26 vortaroj de [lenu.net](http://lenu.net) kaj de nia vortaro. Li ankaŭ havas ideojn koncerne novan Esperanto-danan vortaron (kiu do estos daŭriganto de la Bick-vortaro).

## **Ĉu vi tediĝas de papero?**

Se vi preferas ricevi ĉi tiun revuon retroŝte kiel pdf-dosieron, simple petu ĉe la redaktoro

**[jens\\_s\\_larsen@yahoo.dk](mailto:jens_s_larsen@yahoo.dk)**.

Savu la mondajn arbarojn kaj ŝparigu al DEA afrankon!

# Ĉu...?

... vi jam aĉetis nian novan vortaron Dansk-Esperanto  
kun 458 paĝoj kaj 34.013 kapvortoj?

Restas ankoraŭ malgranda stoko de la unua eldono

Prezo DKK 250.- + eventualaj sendokostoj

Bonvolu telefoni al mi: 2140 8487 (Arne Casper)



*La vortarista grupo pozas:  
Ileana, Jens, Arne, Sven, Tara, Bent kaj Regin*



# Ŝercoj




- Do, vi uzas tri parojn da okulvitroj!
- Jes, unu paro por longa rigardado, dua – por mallonga, kaj tria – por serĉi la aliajn du.
- Peĉjo, kiu monato havas dudek ok tagojn?
- Ĉiuj, fraŭlino instruisto.
- Kaj kia fariĝos via filo pos la lasta ekzameno?
- Maljunulo ...

Ni revas pri Esperanto-domo, ĉu ne?



Ĉu ni revu pri tia grandioza konstruaĵo?




Ne necesas! Tia dometo sufiĉas!



Sed sen mono ni ne povos aĉeti brikojn.



Kaj sen brikoj ni ne povos konstrui la domon.



Tial bonvolu donaci al la Esperanto-Doma Fonduso. Ĉiuj donacaĵoj estas imposto-depageblaj.


Kontnumero 4230 – 4230818843

# Kopenhagaj esperantistoj ekskursetas



Kolektiĝo en la stacio Østerport, ironte al “Kastellet” (kiu iom konfuzo signifas “la citadelo”).

Ventomuelejo en la citadelo, kiu ankoraŭ antaŭ malmultaj jardekoj muelis farunon por la citadelaj soldatoj.



La Marvirineto aktuale profice troviĝas en Ŝanhajo, sed oni establis rektan vidan konekton al ŝi ĉe ŝia normala sidejo.